1-a Jaro, N-o 44 APERAS S.A.T. SEMAJNE 30. Julio 1925

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Redaktoro: N. BARTHELMESS Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz | Gvidanto: Ekzekutiva Komisiono de SAT 23, rue Boyer, Paris XX | Administranto: R. LERCHNER Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz

Neforgesebla datreveno

Oni tradicie rememoras kaj festas la 10., 25., 50. kaj 100. datrevenojn de iu grava okazintaĵo. Iun el tiuj datrevenoj oni havis en pasinta jaro: la 10-jaran datrevenon de l' tutmonda milito. Spite al kutimoj kaj gazetaj tradicioj, kiuj notas pri "rondciferaj" datrevenoj, mi ne povas resti sen ion diri ankaŭ okaze de l' 11-jara datreveno.

Tiu ĉi dato estas *neforgesebla:* la viktimoj kaj suferoj de internacia proletaro vivateste montras al ni, ke l' dato de l' milito estas brule stampita sur korpo de l' socio. Neniam tiom da viktimoj kaj mizeroj laborantaj masoj havis nur dum unu jardeko kaj neniam en historio de l' homaro oni estis konstatintaj tiajn postsekvojn de l' milito, kiajn havas la nuntempanoj.

11 jaroj pasis de-post tiu terura tago, kiam imperialistoj okazigis la militon. Dum 4 unuaj jaroj daŭris freneza interbuĉado de l' popoloj. Preskaŭ la tuta laboranta viraro, — milionoj da laboristoj kaj agristoj, estis fortiritaj el siaj laborejoj kaj viktime por sangavida militdio Moloko, estis kvazaŭ dispistitaj en kolosatra pistujo; poste venis ĝis nun daŭranta periodo de sklavismo, kiu kreis por proletaro reĝimon de punlaborejo, — kiam kontraŭ ĉiu protesta movado de l' dungitaj sklavoj kaj sklavigitaj popoloj en kolonioj agresema kapitalistaro respondas per teroro kaj punekspedicioj.

Laŭ burĝaj historiistoj, la historio neniam ripetiĝas. La nuna sklavismo multe diferencas de tiu antikva sociordo, kiam la homo estis "cirkulebla varo"; almenaŭ antikva Romo ne havis tiajn subtilajn rimedojn de sklavigado, kiuj karakterizas nian epokon.

Tial por nuna periodo oni trovis pli belan nomon "stabileco de kapitalismo" ...

Socialismo ankoraŭ ne venkis kapitalismon definitive en tutmonda skalo. Tamen du gravajn venkojn konstatis la historio. La unua nekontestebla simptomo de l' venko estas la evidenta fakto: Sovet-Unio kun proletara registaro en landaro, kiuj ŝajnis esti la pej fortika fundamento de l' absolutismo; la dua venko: de ĉiuj agnoskata imperialisma karaktero de l' tutmonda milito. Ankoraŭ ne malaperis la freŝeco de tiu impreso kiam tutmonda burĝaro kaj socialpatriotoj indigne bojadis kontraŭ tiuj internaciistoj, kiuj dum konferencoj en Cimmervald kaj Kintal antaŭ la vizaĝo de l' vundita socio, grimacanta pro konvulsioj de l' milito, proklamis la alvokon: „for la raban militon de imperialistoj. Vivu la interklasa milito, liberigonta la popolojn!" Tamen nun la imperialisma karaktero de l' milito estas kontestata de neniu el burĝaj sciencistoj.

Ekz., germana burĝa sciencisto Schulze, rafinita malamiko de socialismo, en sia verko, dediĉita al milito, interalie diras: "ju pli longe la tutmonda ekonomia vivo estos sub influo de obstina frenezularo, des pli fariĝos neevitebla tiu danĝera rezulto, kiu minacas al la mondo, ĝisfunde ruinigita per potenco de rabemaj imperialistoj en financfortaj ŝtatoj. La alia burĝa eminentulo, itala eksministro F. Nitti, en sia verko "Eŭropo sen paco" skribas: "Post la venko de Antanto la mikroboj de malamo elmontras sian disvastiĝon en formo de naciaj egoismoj, imperialismo kaj konkeremo" ... Ĉu malaperis nun tiu postmilita nebulo, kiam la kialoj de l' milito estas "marksane" konceptataj de ĉiuj klasoj de burĝa socio? Ne, la lastaj jaroj post Versajla paco, de post kiam eksilentis la kanonoj sur batalkampoj, ankoraŭ plidensigas tiun sangan nebulon, kiu vaporiĝe leviĝis super buĉejo de imperialista milito. Estas karakteriza la respondo de iu norvega ministro, demandita de ĵurnalistoj baldaŭ post versajla pac-traktato. Li ironie estis dirinta: "vi demandas min, kion mi atendas de tiu ĉi paco? De-nun mi atendos *"belajn vortojn, malbonajn agojn kaj la novan militon"*...

Efektive, la kapitalismo dum postmilita periodo venis en senelirejon, de kie estas ebla nenia eliro sen nova milito. La interklasa antagonismo dum lastaj 11 jaroj atingis plej altan gradon de sia akuteco malgraŭ ĉiuj penoj de burĝaro kaj oportunistoj por malfortigi ĝin. La postmilita kapitalismo ne povas fiksi la nivelon de sufiĉa bonstato; la vivnivelo de laboristaj masoj malaltiĝas pli rapide. Por evitigi la krizon kaj ribelemon de l' subprematoj, la kapitalistaro plifortigas la ekspluatadon, lasante milionojn da laboristoj ekster la fabrikejoj. Sed tiu ĉi recepto de l' socia kuracado, konsumanta laboristaran forton, ne havigas deziratan rezulton. La kresko de interklasa lukto, malkontento ne nur de proletaro, sed ankaŭ de agristaro, ekribeloj de koloniaj popoloj, revoluciemo de Oriento, vekita per eĥo de proletara revolucio en Sovet-Ruslando, — ĉio ĉi kredigas al burĝaro, ke ĝia potenco estas ĉiam perdebla, kaj Kominterno estas tiu

aŭguro, kiu ĉiam memorigas pri la morto. La burĝaro jam ne povas sin defendi per ordinara armeo el mobilizitaj vilaĝanoj kaj laboristoj por kvietigi ribeleman proletaron. Ĝi estas devigita uzi novajn metodojn por sin defendi. Faŝistaro estas speco de burĝa armeo, organizita laŭ klasa principo, dank' al kiu la burĝaro sukcesis venki en la unuaj bataloj.

Ĉiu potenca ŝtato, regata de imperialistoj, en la kondiĉoj de l' tutmonda ekonomia disfalo, tendencas venki la krizon per propraj fortoj sed per kostoj de siaj najbaroj. Tiuj ĉi tendencoj rezultigas akutan interluktadon de plej potencaj regnoj, kiuj en prepara periodo de latenta milito grupiĝas laŭ ŝanĝoj de l' politika vetero. Dank' al izoligo de Sovet-Ruslando kaj ekonomia dekado de Meza Eŭropo la antagonismoj de Usono, Anglio kaj Francio akiras la karakteron de nesolvebla problemo. La tendencoj de usona imperialismo vastiĝas trans oceanon kaj plaŭdigas la ondojn ĉe la bordoj de anemia Eŭropo. Pretigante la armilojn por-kontraŭ Usono, Anglio samtempe tendencas fari siaj vasaloj apudajn landojn de meza kaj orienta Eŭropo. Por konservi sian mastrecon sur kontinento, Francio por rezistado kontraŭ Anglio jen projektas strategian fervojon trans Saharo, jen akiras bazon per milito en Maroko . . . Kompreneble Anglio dum certa periodo devas konsideri agresemon de francaj imperialistoj, sed tiu ĉi neceso nur pliakutigas la ekzistantan antagonismon inter ili, ĉar por atingi tutmondan hegemonion, Anglio neeviteble devas fari Francion influata regno.

La burĝaj imperialistoj de ĉiuj landoj sin ne demandas, ĉu ili havas sufiĉe da fortoj por nova milito; ili ne demandas ankaŭ la permeson de tiuj klasoj, sur kies ŝultroj kuŝas la tuta pezo de laboro por restarigo de ruinigita socio. Kiel furioza fluo de l' torento, la mondo rapide proksimiĝas al nova milito, kvazaŭ celante plej baldaŭ solvi la turmentan krizon, kiun kreis la milito kaj di-socio de l' tutmonda ekonomio.

Du fortoj renkonte iras unu kontraŭ la alia: "nova" (per sango de malvenkitaj popoloj renovigita) Usono kaj kaduka kapitalisma Eŭropo. La potenca, financesana kapitalismo de Usono ne tre tendencas novan militon: ĝi estas kapabla per pacaj rimedoj subigi tutan Eŭropon, trapenetri ĝin laŭlarĝe kaj laŭlonge per ekonomia influo kaj eĉ aĉeti ĝin tutkorpe kun ĉiuj intestoj. De tio aperis "pacifismo" de usona burĝaro, tre trankvila pro financa grasiĝo. Ekonomie dekadanta Eŭropo ne povas kontraŭstari konkuradon de pli potenca Usono. Tamen eŭropa burĝaro ankaŭ ne volas esti manĝita de sia kontraŭulo kaj preferas manĝi la aliajn. Pro tio devenas "armada febro", kiu skuas la malsanan korpon de tuta Eŭropo. Ĉiuj landoj pligrandigas la armilojn por ĉiuspeca batalo: por batalo sur tero, en aero, en akvo kaj sur maro, kaj eĉ por kemia kaj bakteriologia milito, — per venengasoj kaj bomboj kun infektivaj mikroboj.

Paralele kun planoj de l' ekonomia konkerado, flanke de Usono, Eŭropo preparas planojn de grandioza milito.

Meze de tiuj ĉi rapidflugaj torentoj de diversaj antagonismoj, imperialisma konkeremo kaj konkurado, apartan situacion havas Sovet-Ruslando, kies politiko laŭiĝas konforme ne al financaj interesoj de regantaj trustoj, sed konforme al ekonomiaj interesoj de tutmonda proletaro.

Nun plenumiĝis grandioza transflugado de ruslandaj aeroplanoj laŭ linio: Moskvo-Pekino. La transflugado celas demonstri teknikajn sukcesojn de ruslanda aviado kaj solidarecon de ruslanda proletaro kun ĉina popolo, subpremata de imperialistoj. "Saluton al ĉina popolo" estas skribita sur ŝvebiloj de sovetaj aeroplanoj. Kaj kiel kruda kontrasto kun tiu bildo en imago de ĉiama leganto de l' ĵurnaloj konturiĝas drednoutoj, ĵus venintaj en havenon de Shanghai kun 10 000-soldata angla armeo, kiu ne avaros la kuglojn por regali ĉinajn strikantojn kaj sklavigi ĉinan popolon.

Sovet-Unio jam transpaŝis la limon, post kiu restas malantaŭe la periodo de akuta klasbatalo kaj nacia malamo. Sovetaj respublikoj rapide progresas laŭ vojo de paca konstruado. La landlimoj de Sovet-Unio samtempe estas la limoj de du mondoj, kaj tiuj limoj pli forte ol milionoj da voĉoj avertas pri pereo de malnova mondo de kapitalismo.

Sed kiam la pereo minacas al klasa sociordo, kreita de ekspluatistoj, la lastaj provas savi ĝin per milito. Kiam pro tondrego de kanonoj, eksplodoj de falantaj bomboj tremas la tero kaj ĉio vivanta sur ĝi, kiam ĉies buŝoj parolos malamon, tiam dungitaj sklavoj de kapitalo ne havos tempon por pensi pri siaj klasaj interesoj. Tiel kredis kaj nun opinias la burĝaro. Jen kial malgraŭ sia senfortiĝo kaj abomeno ĝi avide celas trinki refoje el sangoza torento de l' milito.

La proletaro, kiu per maldolĉa sperto ekkonis la veran karakteron de l' "defenda" milito, nun ne permesos sin trompi. Nun ĝi volas fini danĝeran ludon de burĝaj imperialistoj. Laborantaj masoj scias, ke nur socialismo liberigos la homaron. Ekzistas nur sola forto, kiu evitigas frenezulan batalon inter popoloj. Ĝi estas la forto de kreiva laboro. De kiam la laboro unuigas la proletaran armeon per fortikaj ligiloj de internacia solidareco, la regantaj imperialistoj en ĉiuj landoj bonege komprenas la danĝeron, kiun havigos okazebla milito. La laboro kreas kaj la milito detruas. Tial ĉiujare, kun ĉiu datreveno de eŭropa militaro, ni ĉiam ripetas: proletaroj de ĉiuj landoj, gardu vin kontraŭ nova trompo! Vivu la enlanda interklasa milito, liberigonta la homaron!

N. Krassovskij.

Mallonga Skizo de Labormovado en Japanio

Historio ĝishodiaŭa

Socia movado dum mondmilito. — Impulso de la Rusa Revolucio. — Refortiĝo de kapitalista klaso. — Disfalo de sindikata movado. — Ŝanĝo en la metodoj de sindikata agado. — Senfruktaj unuiĝ-provoj. — Eksigoj kaj novfondo.

Estas depost 1918, kiam labormovado reale kreskis en Japanio. Ĝis tiam japanaj laboristoj havis preskaŭ nenian organizon, kaj je tia kondiĉo estis ekvilibrataj kapitalo kaj laboro.

Maltrankvileco de l' socio kaj sociaj ideoj kiuj estis ege evoluantaj dum kaj post la mondmilito impulsis kaj vekis longe dormintan japanan laborklason eksplutatan. Plue la venko de l' Rusa Revolucio en 1917 treege impulsis laboristojn. Ili ekmemkonsciis siajn fortojn. Sindikatmovado rapide evoluis, ekvilibro inter kapitalo kaj laboro rompiĝis, kaj la stato bone malvolviĝis por laborklaso. Multaj sindikatoj naskiĝis dum mallonga tempo: 11 en 1918, 71 en 1919. 417 strikoj en 1918, 497 en 1919 okazis kaj multparto el tiuj finis per venko de laboristoj.

Kapitalistklaso grade plenigis sian batalpovon, mobilizante siajn tutajn potencojn ekonomian, politikan kaj idean, la kapitalo komencis mortbatalon. Plue ekonomia krizo, kiu abrupte atakvenis en marto 1920, malbonege influis al la labormovado. La batalo iĝis defendema por laborklaso. En ĉi-jaro nur 282 strikoj okazis.

Pro malfacileco de laboro kaj senesperiĝo je politika kampo la gvidideo de l' sindikatmovado grade iĝis sindikalisma, kaj ĉi-ideo subigis "movadon je postulo de universala voĉdono" — kio ekokazis 1919 en la sindikatoj.

Daŭra stagnacio ekonomia pereigis malĉastajn sindikatojn kaj ordigis pli bataleme la restintajn. Sindikalismo havis sian prosperon je la movado en 1921, sed la movado grade apartiĝis de la amaso kaj malfortiĝis. Ekaperis penso, ke marŝdirekton oni devas ŝanĝi.

Por plenigi sian batalpovon kontraŭ ekonomia stagnacio kaj atako de l' kapitalistklaso, laborsindikatoj projektis tutfederacion de l' sindikatoj. En septembro 1922 la fondkunsido de tutfederacio estis malfermita, sed post longa diskuto, malsameco de l' ideaj bazoj, sur kiuj staras sindikatoj — unuigismo kaj liberfederismo — rompis la notindan kunvenon.

Depost la disiĝo de projekto de tutfederacio, la ideo de sindikalismo ekmalprosperis en la movado. "Ŝanĝo de

l' marŝdirekto" estis insistata, kaj kun moto "al amaso" la ideo de Marksismo ekprosperis en la sindikatoj.

La terura tertremo en la distrikto de Tokio 1. 9. 1923, pro kio 300000 domoj brulis, 100000 homoj pereis, 9000 fabrikoj ruiniĝis, kaj 50000 laboristoj senlaboriĝis (ankaŭ pro kio 9 gvidantoj de la sindikato en Tokio estis fimortigitaj de policanaro), igis pli realemajn manierojn de la sindikatmovado.

En ĉi-jaro Jamamoto-Kabineto deklaris baldaŭan efektivigon de l' universala voĉdono. Plimulto da sindikatoj sintenis utiligi parlamenton kiam u. v. estos efektivigata.

En 1925 bilo de universala voĉdono finfine pasis la parlamenton, kaj samtempe estis konsentata bilo por "tenadi sociordon". Ĉeflinio de ĉi-lasta bilo estas ke tiu kiu organizas kaj aniĝas societon, kiu celas reformi nacian konstitucion aŭ regformon, nei privatposedrajton, estu kondamnata per 10-jara punlaboro.

Nun ĉi-kruela bilo leĝiĝas kaj estas efektivigata, kaj ekbaras vojon de l' laborista movado.

* * *

Disduoniĝo de N. R. S. (Japana Laboro-Tutfederacio)

Nun en Japanio estas 3958000 laboristoj, el kiuj nur 230000 estas organizitaj, kaj Nippon Rôdô Sôdômei (Japana Laboro-Tutfederacio) havas 28000 membrojn, nur 12% de la organizitaj. La nomo de Tutfederacio estas nura nomo. La federacio estis tamen la plej potenca el la sindikatoj kaj estis gvidanto de l' japana labormovado. Deklarante "ŝanĝon de l' marŝdirekto" je sia kongreso en 1924, la N. R. S. dekstren ekmarŝis, kaj eraro tuj sekvis. Kriante la moton "al amaso", la gvidantaro de N. R. S. kompromisis kaj kooperaciis kun kapitalista klaso kaj registaro. Al laborklaso nenion alportos krom kapitulaco la kompromiso kaj kooperacio kun kapitalisto en hodiaŭa stato kiam japana kapitalismo jam atingas la finon de sia evoluo. La gvidantaro de N. R. S. perfidis laborklason por akiri siajn privatajn profitojn. Ĉi-fakto estis malkaŝata okaze de l' kongreso en 1925 de la federacio per akraj demandoj de kelkiuj ĉeestantoj. La ĉefoj intencis eksigi ĉi-demandintojn pretekstante ke ili estas malordigantoj de la N. R. S. Reformigmovado de la federacio sekvis. Burokratigita profitsoifa gvidantaro kuraĝe eksigis siajn kamaradojn longtempe kunlaborintajn kiuj kaptis la okazon kaj aliĝis reformigmovadon. 30 sindikatoj kaj 12000 membroj apartiĝis de la N. R. S.

La eksigitoj kunsidis en majo kaj fondiĝas Nippon Rôdôkumiai Hjôgikai (Interkonsilsocieto de Japanaj Laborsindikatoj). Okaze de ĉi-fondiĝo ree ĝenerala federacio estas ekprojektata inter batalemaj sindikatoj krom N. R. S. Ĝis nun tutfederacio estis ofte projektata, sed ĉiam baris tion la imperialisma sintenado de la N. R. S.-a gvidantaro.

Baldaŭ ni povos raporti fondiĝon de vera tutfederacio de l' sindikatoj.

Satano 2504.

La Bukureŝta komunista proceso

Sub ĉi-nomo estas konata en la tuta lando la procedo postsekvinta al la en decembro 1924 okazinta arestado de l' gvidantoj de prol. movado.

Tiutempe estis arestitaj ĉirkaŭ 600 gekamaradoj, gvidantoj de l' unueca sindikata kaj de komunista movado. Ĉe la "siguranccoj" (kiu ne jam konas ĉi-institucion?) trafis ilin la besta batado kaj la perforta devigo por subskribi deklaraciojn, en kiuj ili konfesas siajn "kulpojn". — De la diversurbaj "siguranccoj" oni transportis ilin en subteran karceron de Jilava, kie la gekamaradoj per malsat- kaj soifstriko klopodis devigi la karcer-estraron por plibonigi siajn statojn kaj por esti reliberigataj. Okazis ekz., ke k-do Dobrogeanu malsat- kaj soifstrikis *36* tagojn por esti reliberigita! Oni imagu: 36 tagojn nenion manĝi, nenion trinki! Vizitis ilin ĵurnalistoj ekster- kaj enlandaj, ankaŭ Costa-Foru (fama publicisto rumana, sekretario de rumania sekcio de "Ligo de Homrajtoj"), kiu eĉ eldonis broŝuron enhavantan la deklarojn de arestitoj, lian komenton. — Sekve de la malsat- kaj soifstrikoj kaj de tiu broŝuro, kaŭzintaj grandan indignon de l' demokrataj kaj vilaĝanaj rondoj, la k-doj estis iom post iom reliberigataj, tiel, ke je la fino de aprilo restis nur 53 gekamaradoj akuzataj el la arestitaj 600! Tio-ĉi karakterizas la "siguranccojn", kiuj arestas homojn pogrande nur por pravigi sian ekzistadrajton, kaj post kiam oni suferis la teruran batadon, malsatstrikojn, la juĝantaro reliberigas la plimulton, ĉar ĝi trovas nenian motivon por povi akuzi ilin. — La restintaj 53 estis akuzitaj pro aparteno al fremda registaro kaj pro kunlaboro kun ĝi por renversi la nunan reĝimon de Rumanio, (oni sciu ke la Rumania Kompartio, nuntempe nelegala, aliĝis la III. Internacionalon). La akuzantaro motivis la akuzon per la identigo de Kominterno kun soveta registaro, malgraŭ ke plej eminentaj intelektuloj, politikistoj demokrataj klopodis pruvi dum la traktado, kiel defendatestantoj, ke Kominterno estas tute separatigita de soveta registaro. Dum la traktado, kiu entute daŭris 36 tagojn, la akuzitoj denove malsatstrikis por devigi la juĝistaron je plibonigo de stato: 16 k-doj el la akuzitoj, kiuj estis reliberigataj antaŭ ol komenciĝis la traktado, tamen devis ĉiutage prezenti sin ĉe la traktado; do tiuj-ĉi 16 gek-doj la 25. de majo subskribis deklaracion, en kiu ili deklaras, ke ili ne sentas sin kulpaj kaj ne ĉeestos la klasjuĝadon. De tiu tempo ili tute malaperis kaj ne estis troveblaj malgraŭ la febra serĉado de l' ĉiurbaj fisiguranccoj. — La 9. junio okazis la kondamno, kiu tekstis jene: 3 k-doj estas kondamnitaj "in contumaciam" je 10 jaroj da pundomo,

1 k-do je 5 jaroj da pundomo,
2 " " 3 " " "
1 " " 2 " " "
1 " " 1 " " "
10 " " 1 " " malliberejo kaj 10000 leoj da monpuno,
2 " " 6 monata malliberejo,
4 " " 4 " "
13 " estis malkondamnitaj.

La 24. de junio okazis la traktado de l' formalaperintaj 16 komunistoj, kiuj estis kondamnitaj ĉiuj "in contumaciam" je po 10 jaroj da karcero.

Skribemulo.

TRA LA KLASBATALO

La Ruhr-teritorio estas liberigata de la okupaciaj trupoj (belgaj, francaj) dum tiuj ĉi tagoj.

La granda komunista manifestacio kontraŭ la milito ĉe Paris planita por la 2. 8. estas malpermesita de la registaro.

Radiĉ perfidis la revolucian tradicion de sia partio kaj konsentis partopreni en la nova registaro de Jugoslavio.

Delegitaro de germanaj laboristoj, kiuj estas studontaj Sovetion, alvenis post vizito de Leningrad en Moskvo.

En Lisboa denove okazis oficira ribeleto, kiu rapide estis subpremata de la registaro.

Centra Komitato de Rusia Komunist-Junularo publikigis statistikon pri la nombro de kom. junuloj en Sovetio. La kom. junularaj org-joj tra Sovetio nombras **1,503,000 aktivajn kaj aspirantajn membrojn.**

Laŭ decido de l' Mongolia registaro, la armeo de l' sendependa mongolia ŝtato estas alinomigita je "Ruĝa Popola Armeo".

Tra Sovetio estas atendata bona grenrikolto. Kiel sekvo oni atendas diskreskon de l' industrio kaj komerco. — La metalurgia, mineja, teksa industrioj de aŭtuno plilarĝigos sian produktadon, malfermos novajn entreprenojn kaj varbos milojn da laboristoj. En nura Ukrainio estas konstruotaj 22 novaj fabrikoj kaj uzinoj. — Plivigliĝos la fervojcirkulado dum aŭtuno.

Aperis komunikoj pri la senĉese kreskanto nombro de "labkor-oj"[1] en Sovetio. La nombro de labor., junular., vilaĝ., sindik. kaj militist. korespondantoj atingis 100000. Moskva "Pravda" havas 1000 koresp., "Gudok" (Signalfajfilo) 5000, Siberia „Gudok" 600, Blankrusio havas 2000, la Donec-karbbaseno 2000, Kirgizio 700, Uzbekio 500. Estas "labkor-oj" inter tataroj, kirgizoj, turkmenoj, ĉuvaŝoj, ĉinoj ktp.

Averto!

La sovetiaj gekamaradoj estas denove tre petataj, *neniakaze* sendi ajnan poŝtajon senpere el Sovetio al Rumanio, ĉar en Bukureŝto estas en la centra poŝtejo starigita speciala komitato, kiu kontrolas eĉ p.-kartojn, malfermas leterojn ktp. Bonvolu ĉi tion bone priatenti la sovetia gek-daro! *Spertinto.*

[1] Laboristaj korespondantoj.

La Leipziga sindikata festo 1925

Malgraŭ varmega julia vetero la ĉi-jaran sindikatan feston en Leipzig partoprenis giganta hom-amaso. Pompan aspekton prezentis la interesa kaj longega festdemonstracio, kiu portis kun si grandan aron da afiŝoj kaj transparentoj kaj kondukis en sia mezo bele dekoritajn veturilojn, simboligantajn la diversajn metiojn. Tiel la transportlaboristoj, la libropresistoj, la felistoj, la konsum-unuiĝo, la konstrulaboristoj kaj la metallaboristoj kaj la multaj aliaj metioj estis prezentintaj siajn arte ekipitajn veturilojn. Tre bele ankaŭ efikis la sportulaj batalionoj, kiuj formis grandan aron. Ne estu forgesate mencii, ke ankaŭ la esperantistaj kamaradoj kune partoprenis la iradon kun standardo, afiŝoj kaj dometo, sur kiu oni povis legi la SAT-devizon: "Esperanto ne estas la celo de nia agado, sed nur rimedo por atingi la celon.

Rimarkinda ne nur estis la eksterordinare grandnombra partopreno je la festo, sed ankaŭ la fakto, ke ĝi, kvankam kelkaj politikaj grupiĝoj forte sin trudis al la okuloj, montris la tendencon al unuecigo de la sindikata movado. Laŭ sindikatoj kunigitaj, marŝis unuece socialdemokratoj kaj komunistoj. Tio certe estis la plej bela trajto de la ĉi-jara sindikata festo. Ni esperu, ke ĝi estas bona signalo por la estonto! Vivu la sindikata, vivu la laboristara unueco! *B.*

DISKUTEJO

Pri la organiza temo

(Daŭrigo)

Lastan semajnon, mi montris, ke la kritikoj, kiujn faras al SAT k-do Sproeck kaj aliaj internacianoj estas senbazaj, subjektivaj kaj ke la sinteno de la kritikantoj estas klarigebla nur per ilia dekomenca malsimpatio kontraŭ nia organizaĵo.

Hodiaŭ mi provu klarigi la kialon de tia malsimpatio. Por tion fari necesas nur ekrigardi malantaŭen. Necesas memori, ke, en 1914, k-doj Rauschenbach, Kloeck, Sproeck kaj aliaj estis interkonsentintaj pri starigo de esperantista internacio. Jam presita estis projekto de Statuto[1]). Sed la milito eksplodis. La projekto ne povis do ricevi tujan efektiviĝon. Sed ĝi estis zorge konservata kun la espero, ke, post ĉeso de l' milito, finfine venos la favora tempo kiam ĉiuj esperantistoj entuziasme alprenos la bonan, dum jaroj maturiĝintan projekton. Bedaŭrinde, ĉi-tie en Paris tiu projekto ŝajnis al ni tute necelkonforma, neniel respondanta al la nepra neceseco de aparato ebliganta la tujan aplikadon de esperanto por la klasaj celoj de l' proletaro tutmonda. Ni starigis alian projekton, kiu ricevis la aprobon de multaj k-doj el diversaj landoj. Sekve, ni malhelpis la efektiviĝon de la antaŭmilita projekto tiom kara al la internacianoj.

En tio kuŝas ilia dekomenca malsimpatio kontraŭ SAT.

Mi memoras kiom da leteroj mi interŝanĝis pri la temo, en la jaroj 1920—21, kun k-do Rauschenbach, kiu estis tiutempe redaktoro de "Der Arbeiter Esperantist" kaj kiun k-do Sproeck anstataŭas en tiu ofico. K-do Rauschenbach argumentis tutsame kiel la hodiaŭaj internacianoj. Neniam li konsentis aliĝi al nia organizaĵo, kiun li opiniis nepre fiaskonta. Eble pro tio, ke la profetata fiasko ne okazis, li preferis aliĝi al la "neŭtra" UEA, kies delegito li estas nun!! Notinde estas, ke la eksredaktoro de *Der Arbeiter Esperantist* estis (eble ankoraŭ estas) komunisto kaj fervora klasbatalulo.

K-do Kloeck ankaŭ neniam konsentis aliĝi al SAT. Senĉese li klopodis por starigo de ia internacio. Lia malsimpatio kontraŭ nia organizaĵo plurfoje manifestiĝis en *"Intermembra Informilo"*, organo de *Nederlanda Federacio de Lab. Esp.*, per atakoj tute malĝustaj kaj eĉ, plej riproĉinde, rifuzis publikigi nian ĝustigan respondon. La legantoj prijuĝu mem tiun konduton ...

K-do Sproeck laŭdinde aliĝis al SAT. Sed hodiaŭ ni spertas, ke tio estis nur taktiko, ke li ne rezignis je la intenco trudi la malnovan, antaŭmilitan projekton. Kompreneble neniel li estas pro tio riproĉinda. Li ja rajtas en la kadro de nia organizaĵo defendi sian vidpunkton.

Tamen necesas noti, ke k-do Sproeck konkludis sian artikolon per kvazaŭa minaco. *"Fondo de internacio certe okazos"*, li profetas. Povas esti. Sed tiaokaze, kiuj estos respondecaj pri la disiĝo de la laboristaj esperantaj fortoj? Ĉu la internacianoj aŭ la sennacianoj? ...

Ĉi-lastaj starigis asocion, *kiun povas aliĝi senescepte ĉiuj klasbatalemaj esperantistoj.* Tiu organizaĵo jam ekzistas kaj funkcias de kvin jaroj. Vane oni provus montri, ke ĝia strukturo ne taŭgas por la praktika aplikado de esperanto. La faktoj cetere montras ĝian taŭgecon ĉiutage. La sperto pruvas, ke ni direktis la esperantan laboristan movadon sur ĝusta vojo. Se la entrepreno ne kreskas tiel rapide kiel dezirinde, tio rezultas ne nur de l' kontraŭemo de la internacianoj, sed ankaŭ kaj ĉefe de la malbonaj cirkonstancoj, ekzistantaj en la postmilita periodo, kiun ni travivas. Ĉu oni ja povas malatenti, ke SAT estas malpermesata en kelkaj landoj; ke mizera situacio malhelpas multajn k-dojn partopreni nian movadon?

Konsidere la rezultojn jam atingitajn de nia organizaĵo dum tiuj malfavoraj cirkonstancoj, ĉu oni povas prave hipotezi, ke ili estus pli grandaj se, anstataŭ SAT, ekzistus la internacio? Mi restas firme konvinkita, ke ne. Eble la internacio estus iom pli multanara. Sed ĉu tio pruvas, ke ekzistus pli da laboristoj serioze *praktikantaj* esperanton? Ĉu estus pli da verkoj eldonitaj? Ĉu niaj esperantlingvaj presorganoj havus pli da abonantoj; unuvorte ĉu la k-doj povus tiri pli da profito el la scipovo de esperanto?

Jen kiel oni devas prezenti al si la problemon por trovi ĝustan solvon.

Mi restas ĉe la konvinko, ke se, en 1920, oni efektivigus la projekton de la internacianoj, hodiaŭ ni ne havus monatan revuon, semajnan ĵurnalon kaj la dekon da volumoj, kiujn jam eldonis SAT.

Kompreneble mi ne pretendas, ke ĉio estas perfekta en la SAT-aparato. Ne malpli ol iu ajn mi vidas la mankojn. Sed la sistemo taŭgas, la direkto donita al la laborista movado ĝustas. Ni paŝas sur la bona vojo. Sekve necesas nur perfektigi la aparaton, plilertiĝi en ties manipulado kaj antaŭeniri — ne tro atentante subjektivajn riproĉojn de malkontentuloj.

Ankoraŭ unu vorton. La SAT-anaro havas la rajton ŝanĝi la Statuton de sia organizaĵo. Se la plimulto decidus, ke la nuna sennacieca strukturo devas esti aliigota en internacian, mi obeus la decidon, kvankam mi restus konvinkita, ke tia ŝanĝo estas ega maltrafaĵo.

Per tiu deklaro mi celas montri, ke mi konsideras pli grava la unuecon de la esperanta movado laborista ol la pravecon de iu principo. Sed mi kredas ne erari, opiniante, ke la granda plimulto da SAT-anoj volas konservi la sennaciecan strukturon. La sennacianoj ne malesperas konvinki la internacianojn.

La Novo venkos la Malnovon ... *E. Lanty.*

[1]) Estas interese noti, ke en tiu statut-projekto estas parolite nur pri propagando de esp-o, neniel pri ĝia aplikado. Jen karakterizaj citoj: "**Celo** . . . *b) subteni la propagandon por la disvastigado de la mondhelplingvo Esperanto en la popolamaso ĉiulanda* . . . d) *Rilate al nacieco, politiko, religio kaj ĉiuj ajn personaj konvinkoj* la **Internacia Lab. Esp. Asocio** *rezervas neŭtralan karakteron* . . ,"

Unuecforma aŭ unuecspirita movado?

(vidi Sennaciulo n-o 39)

K-do Demidjuk en sia artikolo provas dividi la unuecformecon kaj unuecspiritecon de SAT laŭ la reformo. La reformo proponata temas pri *tute unueca* organizaĵo, do unuecforma-unuecspirita!

La malgranda analizo en la komenco de l' artikolo estas ĝusta, nur post la superskribo "praktikaj rezultoj" komencas nelogikaĵoj. La k-do dubas, ke kun aŭtomata SAT-aniĝo samgrade altiĝos la SAT-aneco de novaj membroj. Laŭ la reformo la propagando de sekcioj lingvoregionaj ĉefe akcentos la sennaciismon, pro la praktika sennaciismo oni lernu Esperanton. Do anigante novajn membrojn ni antaŭe klarigas aŭ ili mem iom klariĝas pri la sennacieco.

Per la amas-aniĝo *unue* plifortiĝos la *bazo* de sennacieca movado, *due* SAT firmigos sian *materian bazon*. La novaliĝontoj cetere estos ne pli malbonaj sennaciuloj ol multiuj el la nunaj SAT-anoj.

Krom tio neniam forgesu ke SAT ne nur estas propaganda kaj praktikserva organizaĵo, sed ankaŭ *eduka*.

Ni devas anigi al SAT ne nur jam pretajn sennaciulojn, sed ankaŭ tiujn, kiuj eĉ nur simpatietas. SAT havas la taskon *eduki ilin sennaciecen!*

Ankaŭ se la materia bazo de SAT fortiĝos, nia literaturo sennacieca kreskos, pligrandiĝos la ebloj de niaj tutmondaj servoj kaj aranĝoj — rezulte la spirita unueco kaj membro-edukado nur pliboniĝos.

Malĝuste estas se oni asertas, ke la novaj prop. sekcioj havos la samajn celojn, kiel la nunaj prop. organizaĵoj. Kial? La nunaj prop. organizaĵoj sin okupas pri por-esperanta propagando kun iomete da praktika servado (konkure al SAT), ili plejparte ignoras la sennaciismon kaj havas siajn membrarojn, kiuj konsistas *ne nur* el propagandistoj, sed ankaŭ el pretaj *lingvospertuloj*-ne-SAT-membroj.

La prop. sekcioj havos la taskon nur propagandi (ĉiujn praktikajn servojn transprenos SAT) por Sennaciismo kaj Esp-o nacilingve, ili konsistos nur el propagandistoj SAT-anoj. SAT ne rajtas propagandi nacilingve, sed pro tio la nacilingva propagando porsennaciisma estas unu el la ĉefkondiĉoj de nia sukceso ĉe organizaĵoj kaj proletaraj rondoj. Ĝis nun pri sennaciismo oni *preskaŭ nenion aŭdis*, pro tio suferas nia populareco kaj ne tiom efikas niaj penoj praktike servigi nian lingvon. Sen nacilingva propagando *koncentrita*, ni restos sufiĉe longtempe en infaneca stato.

La zorgojn pro celkonforma organizo en landoj de blanka teroro, plej bone forigas k-do Kolĉinski en sia lasta artikolo "Sur la vojo al unueco" (S-ulo n-o 37). Tie kie la situo ne permesas la starigon de prop. sekcio, tie restu la nunaj organizaj formoj, sed tio tute ne malhelpos la efektivigon de reformo en Anglio, Sovetio, Germanio, Francio k. a. En ĉiu lando la reformo estas *efektivigebla* kaj *efektivigenda!*

Temas ne nur pri "algluo de SAT-matrikulo", sed ankaŭ pri *evoluigo de SAT al amasorganizaĵo.*

La diverseco de niaj organizaĵoj, el kiuj multaj enhavaş ne tro SAT-emajn elementojn kaj revojn pri anti-SATa aŭ ekster-SATa "ruĝverda internacio", nun tre malhelpas nian disvolviĝon.

Ĉiu armeo havas pli da ŝancoj por venki, se ĝi estas unuece organizita kaj enhavas unuecan spiriton.

La celo de reformo kunforĝi tian armeon, krei faktan form- kaj spiritunuecon. *2921.*

Pri niaj vojoj, pri niaj zorgoj

Jam antaŭ du jaroj, en Cassel, la gvida rezolucio de nia kongreso akcentis, ke SAT havas du flankojn de sia organizkaraktero — la kulture-edukan kaj la teknike-servan. Laŭ tiuj du vojoj, direktitaj ja al la sama celo — al la praktika utiligo de Esperanto por bezonoj de proletaro, devis disvolviĝi nia laboro. Kaj taksante niajn sukcesojn dum lastaj du jaroj ni estus malpravaj, forgesinte iun el ambaŭ nomitaj karakter-flankoj de SAT.

Ne estas bezona longa kaj tre detala analizado por konstati, ke ne ĉie ni egale sukcesis, ke ne ĉiam ni egale atentis ambaŭ niajn taskojn.

Semajna "Sennaciulo", literatur-scienca "Sennacieca Revuo", eldonagado de nia Kooperativo kaj laste-naskiĝanta "Biblioteko de Sennaciulo" atestas, ke ni metis multajn fortojn kaj zorgojn rilate la kulture-edukan taskon de nia organizaĵo. Vere, niaj eldonaĵoj estas ja ankaŭ penetritaj per la teknike-servaj tendencoj, sed tio ne elĉerpas la taskon. Gazeto estas kaj povas esti nur *la akso*, ĉirkaŭ kiu disvolviĝas la praktika laboro. Gazeto povas esti organizanto de la praktike-serva laboro, ĝia helpanto kaj akcelanto, sed ĝi ne povas plene anstataŭi tiun laboron mem.

Mi tute ne intencas diri, ke ni plene forgesis la praktike-servan laboron, kies planon skizis por ni la gvida rezolucio de Cassel-kongreso. Ni ne forgesis ja tradukadon de artikoloj el niaj presorganoj — pri tio atestas la recenzejo de Sennaciulo. Mi tute ne intencas diri, ke niaj membroj ne faris gravajn praktikajn servojn al informpetantaj kaj trapasantaj ilian urbon k-doj. Male mi scias pri la gravaj servoj efektivigitaj — sufiĉas eble citi, ke en mia loĝurbo dum lasta jaro k-doj helpis al kvar venintaj el alilando SAT-anoj, trovinte por du laboron, helpinte al la tria en liaj klopodoj antaŭ partiaj organoj pri sendo al laborejo kaj loĝiginte lin ĉe k-doj, trovinte ankaŭ por la kvara k-do laboron kaj loĝiginte lin ĉe si, dumkiam li pli ol unu monaton estis senlabora. Se mi aldonos, ke ĉiuj kvar estis manlaboristoj kaj ke du el ili tute ne havis rezervan monon eĉ por manĝi — estos klara la graveco de tiuj SAT-servoj. Mi ne dubas, ke similajn faktojn povus citi ankaŭ aliurbaj k-doj, sed mi estas tute certa, ke ni povus triobligi, dekobligi tiajn faktojn, se ni ankoraŭ pli multe adaptus nian SAT-aparaton al tiuj praktikaj taskoj, se ni agus pli organizite.

Jes, ni ne faris tiun laboron organizitece, ni ne plenumis (aŭ ne ĉiuloke ni plenumis) la deziresprimon de Cassel-kongreso, rekomendinta ke ĉiu sufiĉe multanara SAT-grupo eligu el si kelkajn k-dojn, kiuj dediĉu sin plene al la praktika SAT-laboro.

Kaj tial ni denove devas atente pridiskuti dum la Viena Kongreso tiun ĉi nian taskon. Ni devas detale pritrakti la demandon pri plia perfektigo de laboraparato kaj ĝia adapto al la praktikaj celoj de nia Asocio, kaj ĉefe — ni devas skizi la planon, kiamaniere ni *efektivigu* niajn decidojn kaj el deziresprimoj faru konkretajn atingojn. Dum la kongreso ni devas serĉi rimedojn por ke niaj lokaj perantoj — la dentradoj de nia labor-mekanismo — estu ne sole nur rimarkeblaj sur marĝenoj de Jarlibro litero "P", sed por ke ili estu funkciuloj de la praktikserva SAT-aparato.

Tio tute ne signifas, ke nur tiu unu k-do el ĉiuj samurbaj SAT-anoj plenumu la servojn — en proleta medio ne deca estus tiu sistemo; ni nin edukas pri la solidareco ne por krei el ni apartajn oficistojn kaj burokratajn aparatanojn. Tute ne — ni devas zorgi, ke ĉiuj k-doj partoprenu en plenumado de la praktikaj servoj, kaj la loka peranto estu kvazaŭ nur dejoranto, kiu disponas ĉiujn rimedojn por ajnamomente funkciigi la servaparaton de sia urbo. Li devas scii, kiun peton povas kaj kapablas plenumi ĉiu SAT-membro de lia urbo; li devas scii en kiu industrifako laboras k-doj kaj kiu el ili povas kolekti necesajn informojn pri laborkondiĉoj en sia fako; kiu k-do havas eblon viziti necesajn instituciojn; kiu k-do povas loĝigi ĉe si kaj kiu povas akompani tra la urbo la venintan alilandan SAT-anon. Kaj posedante tiel detalan "adresaron" de siaurba SAT-anaro la loka peranto povas esti nome la funkciulo, kiu rapide direktas la venintan peton al ĝia fakta plenumonto kaj kontrolos la faktan plenumon.

La freŝa jarlibro de SAT raportas al ni, ke ni havas membrojn jam en 769 lokoj en 40 landoj, jam en 23 sektoroj, jam en ĉiuj 5 kontinentoj de nia terglobo. Do estas jam sufiĉa bazo por komenci perfektigon kaj plenan funkciigon de nia serv-aparato — *jen estas la fakta organiza* problemo de SAT dum niaj tagoj, kiun ni devas ne nur priparoli dum la kongreso, sed kiun precipe ni devas tuj efektivigi laŭ la vojoj, kiujn elektos la kongreso.

Ni devas klare konscii, ke varbado al SAT estas varbado al SAT-ideo kaj ke SAT-ideo estas nome la praktika servo per Esperanto al la proletaro.

Nia sennaciismo neniel estas nuda doktrino, samideanojn por kiu ni serĉas inter la varbatoj. *Nia sennaciismo estas nia proleta ideologio de aktiva, agema solidareco, kontraŭbatalanta ĉiuspecajn barojn, kiujn metas por ĝi naciismo, kaj ilies kaŭzon mem.* Kaj kiel aktiva solidareco ĝi enhavas ne nur la ideon, sed ankaŭ la agon, alivorte — plenumadon de la servoj. Varbante al SAT ni do varbu al tiu sennaciismo kaj la varbitojn ni eduku en la spirito de tiu sennaciismo, por ke ili estu agemaj kaj solidarece servopretaj membroj de nia organizaĵo. Ni varbu per nia konkreta servo-kapablo por proletaro kaj ni eduku niajn novajn membrojn, por ke ili veninte al ni pro praktika valoro de niaj servoj fariĝu mem kapablaj plenumi la servojn.

Tute sincere mi min turnas al tiuj kamaradoj, kiuj celante kreskigi SAT, tiras nian atenton al la *formoj* de proleta espmovado: kamaradoj — *gravas* ankaŭ *la enhavo;* ne sufiĉas amasigi brikojn por konstrui sur ili la palacon de estonto, necesas cementigi tiujn brikojn por ke ili prezentu firman fundamenton por la konstruaĵo. Ne sufiĉas, ke ni nur disdonu niajn Asociajn matrikulojn; ne sufiĉas ke la aliĝantoj rigardu sian kotizaĵon kiel pagon por la jarlibro — necesas ke ili rigardu jarlibron kiel ŝlosilon por utiligi la praktikajn servojn, rajton por kiuj al ili donas la kotizaĵo.

Se ni jam konvinkiĝis, ke la praktika valoro de SAT varbas laboristojn por Esperanto, ni do ekkonsciu, ke per la samaj metodoj ni povas varbi al SAT, ke la plej bona propagando por SAT estas — la praktika laboro en kaj per SAT.

Kaj ankoraŭ io: ni ne timu raporti pri la servoj de ni fakte plenumitaj. Ni vane kaŝas ilin. Lokaj perantoj regule rapórtu al Ekzekutiva Komisiono pri ili kaj la lasta post statistika prilaboro regule publikigu ilin en Sennaciulo, kiu krome konstante raportu adresojn de perantoj en novaj lokoj, aliĝintaj post apero de jarlibro. Tiuj faktoj estos niaj varbiloj por SAT, kaj por dekobligi, centobligi tiujn faktojn ni funkciigu plene la serv-aparaton de SAT.

G. D.

V. Kongreso de SAT

Wien, 11.—15. aŭgusto 1925

Propono n-o XVI

La Kongreso decidu ke la SAT-anoj ricevu la Sennaciulon iomete pli malmultekoste ol la ne-SAT-anoj (kiel faras naciaj organizoj) por ke SAT-anoj ne malmultekostigu la abonon por neŭtraluloj per la membrokotizo.

Propono n-o XVII

La Kongreso entreprenu la eldonadon de tekstlibro por la jam eldonita kantlibro (kun notoj) ĉar ne estas eble al ĉiuj membroj aĉeti la kantlibron kun notoj.

La SAT-anoj de Gablonz a. N.

Propono n-o XVIII

1. La subskribintoj proponas ke la V-a SAT-Kongreso rekomendu al ĉiuj SAT-anoj, kiuj troviĝas en la propagandaj landorganizajoj esperantistaj:

a) batali por ke la land-asocioj enstatutigu, ke ili agadas ekskluzive inter klasbatalemaj proletoj;

b) klopodi por ke la land-asocioj menciu en siaj statutoj ke la SAT-aniĝo estas deviga por ĉiuj lingvosciantaj membroj de l'land-asocioj;

c) klopodi por ke la SAT-anoj havu laŭ la statutoj rajton *mekanike aniĝi al la land-asocioj* t. e. komunikinte sian SAT-matrikulon, pagante minimuman sumon (favoregan kotizon) kaj abonante la landgazeton nur laŭ deziro;

d) klopodi por ke la land-asocioj vigle agadu, varbu kaj propagandu por SAT, por ke la land-asocioj iom post iom fariĝu la veraj propagandejoj de SAT en la nacilingvaj teritorioj.

2. La Kongreso rekomendu al SAT-anoj-propagandistoj kaj kursgvidantoj ke ili organizu sin je propagand-sekcioj de SAT en tiuj regionoj, kie ne ekzistas land-asocioj aŭ kie la lastaj estas malvigle laborantaj por SAT.

3. La Kongreso konfirmu, ke la tendenc-fakoj de SAT (la partiaj frakcioj) havas plenan rajton eldoni per siaj propraj rimedoj tendencajn eldonaĵojn diversajn; sed al la tendenc-fakoj estu rekomendite eviti krudajn kontraŭbatalojn kontraŭ aliaj klasbatalemaj tendencoj; la fakoj penu pledi por sia resp. tendenco, ne tuŝante aliujn.

4. La Kongreso aprobu fondon de intertendenca komisiono kiu zorgu de l'ideologia vidpunkto pri la organo de SAT kaj la eldonaĵoj de l'Eld. Koop-vo. La redaktoro ne estu ideologie respondeca pri la enhavo de "Sennaciulo" kaj de l'eldonaĵoj de SAT.

5. La Kongreso konfirmu, ke SAT-anoj rajtas organizi en diversaj urboj (se ili havas eblecon) laŭtendencajn grupojn, kiuj ĉiuj kune formu solidare agantajn lokajn SAT-gruparojn.

---

6. a) La Kongreso komisiu iun el la viglaj SAT-grupoj de meza aŭ okcidenta eŭropo formi la gvidadon de l'sennacieca Proleta Inform-Gazet-Servo, kiu faru dume almenaŭ la minimuman laboron.

b) la Kongreso aprobu ke la servo konsistu el PIGS-Centrejo (unu k-do aŭ komisiono)

Lingvoregionaj PIG Servoj (gvidantaj k-doj aŭ komisionoj)

Lokaj informantoj (aŭ specialaj komisionoj, aŭ apartaj k-doj; ĉi funkcion povas ankaŭ plenumi la "lab. kor."oj).

c) la Kongreso komisiu al la formota PIGS-Centrejo urĝe ellabori kaj publikigi la statuton de l'Servo.

---

7. La Kongreso agnoskú ke la modera perfektado de la mondlingvo Esperanto dum la praktika uzado per la vojo de simpligoj havas gravegan rolon ĉar

a) ĝi permesas al la proletoj havi pli kaj pli facilan mondlingvon, kiu fariĝos pli kaj pli facile lernebla;

b) la simpligoj permesas pli facilan lernadon kaj tial kontribuos al la pligrandigo de l'nombro de esp-osciantaj k-doj;

c) la simpligoj ne kontraŭdiras la Fundamenton ĉar ili (kiel proponis L. L. Zamenhof) ne anstataŭos sed paralele ekzistos kun la malnovaj formoj; ĉiuj povos kompreni, kompari kaj elekti la taŭgan formon;

d) la simpligoj grave malutilos al tiuj uloj, kiuj penas malhelpi la permondlingvan unuigon de l'proletaro, spekulaciante je kelkaj pridiskutindaj malkorektaĵoj de Esp-o.

8. Tial la Kongreso konsideru ke la paralela uzado de simpligitaj formoj, kiuj estas facilege kompreneblaj de ĉiuj, ne estas maluzenda en la praktika laboro de l'SAT-anaro. Ekzemploj de simplig. formoj: ank-e (-aŭ), anstat (aŭ), ankor-e (aŭ), malgr-e (-aŭ), konfer(enc)o, komit(at)o, prolet(ari)o, situ(aci)o, ktp.

9. La Kongreso malaprobu fetiĉismulan rigardon al Esperanto, ĉar ĝi ne estas inda por revoluciuloj, kaj deklaru ke la mondlingvo Esperanto estas preferata de SAT kontraŭ aliaj *teorie* samvaloraj sistemoj ĉar Esperanto ebligas multoble pli rapidan kaj pli trafan efektivigon de l'ideo pri universala unuigo de l'proletaro.

Frejdberg 4520, I. Avrunin 1122, V. Kolĉinski 1447, Volskij 4076.

Propono n-o XIX

"Al ĉiuj anoj de SAT estas rekomendate (aŭ eĉ devas) aniĝi al kooperativaj unuiĝoj, organizi en ili SAT-fakojn por tiamaniere helpi al pli firma unuiĝo de *Internacia laborula Kooperacio* kaj por plivigligo de internaciaj rilatoj". *J. Brukson, SAT-ano 1896.*

Propono n-o XX

Oni starigu kiel kotizon unu solan nacian monon por ĉiuj sektoroj.

SAT-anoj 3418 kaj 1979.

Al ĉiuj!

Minska Distrikta Komitato de SEU aranĝos internacian ekspozicion de ĉiuj naciaj gazetoj (precipe laboristaj) en Blankrusio. — Gazetojn ni esperas ricevi per niaj SAT-kamaradoj el ĉiuj landoj, interŝanĝe ni povas doni esper. gazetojn, PK, PM, ktp. Adreso: *Minsk*, Poŝtkesto 33, Minska Distrikta Komitato de SEU. Ni atendas!

Kamaradoj!

Helpu al nia germana k-do (SAT-ano), kiu iam batalis por "sankta patrio", nun estas senlaborulo kaj mortas de l'malsato. Mi alvokas ĉiujn miajn gekorespondantojn helpi al li.

Sendu donacojn al k-do *R. Lerchner*, Leipzig-Stötteritz (Germ.), Colmstrasse 1, III.

I. Avrunin 1122, Kremenĉug.

NI SCIIGAS, KE LA VORTARO DE KABE NE PLU ESTAS HAVEBLA! ADM.

Inter ni

"SAT gvidu sur la revoluciajn barikadojn!"

Legante tiun frazon en iu flama, iom pompa simpatideklaro, lastatempe publikigita en S-ulo, mi ŝanceliĝis iomete por decidi ĉu ĝi estas pli ĝojiga ol ridinda.

Certe tre ĝojiga estas la konstato, ke entuziasma junularo tiom alte taksas la rolon de nia organizaĵo.

Tamen, ne necesas longa pripensado por akiri la konvinkon, ke tio estas nur miskompreno pri la taskoj kaj celo de SAT. Tia miskompreno altrudas eĉ logikan konsekvencon, kiun niaj entuziasmuloj verŝajne ne antaŭvidis. Se SAT devas gvidi la proletaron al revoluciaj bataloj, tio signifas, ke la politikaj partioj, kiuj ĝuste difinis al si tiun taskon, ne kapablas kaj ne indas por tiu gvidado!!

Tia estas efektive la konkludo el la premiso ĉi-supra.

Ni estu modestaj kaj iomete pripensemaj. Ni ne ridindigu nian junan movadon per trudo de taskoj, kiujn ĝi ne povas plenumi. Ni prefere relegu en la unua paragrafo de la Statuto jenon: SAT celas: "... c) lernigadi, instruadi, klerigadi siajn membrojn tiamaniere, ke ili fariĝu la plej kapablaj kaj perfektaj el la t. n. internaciistoj ..."

Ĉu tio ne sufiĉas al vi ho! karaj kaj ŝatataj fervoruloj?

SAT ne povas, kaj sekve ne devas, celi politikan rolon. Kiam SAT-anoj staros sur barikadoj, ne SAT gvidos ilin, sed la laboristaj organizaĵoj, kiuj difinis al si la taskon organizi kaj gvidi la ribelantajn proletojn.

SAT estas kaj restu teknika aparato, celanta meti esperanton je la servo de l' proletaro tutmonda. Nia movado estas kaj restu helpa, kleriga, eduka, kultura. Kiel estas dirite en la Statuto, ĝi faru, ke la SAT-anoj estu la plej perfektaj el la internaciistoj t. e. konsciaj sennaciuloj. Eŭtrapel.

Pro manko de loko ni devas prokrasti multan materialon.

Al la tutmonda Anarkistaro

Kamaradoj

En Bulgario, la sorto de la revoluciuloj estas terurega. La senkompatema registaro de l'pseŭdo-profesoro Tzankoff per siaj kruelegajoj, superis ĉiujn konatajn inkvizitorojn kaj ekzekutistojn de la Historio. Li mortigas ne nur la komunistojn, la anarkistojn kaj la agraranojn, sed ankaŭ ĉiun kuraĝulon kiu malkaŝe kaj firme protestas kontraŭ la tutrabadoj, kontraŭ la mortigoj!

En sia deliro, la registaro de la nuntempaj Neron'oj ekstermis Geo Milleff, unu el la junaj bulgaraj poetoj, kiu verkis poemon okaze de la buĉadoj de miloj da senkulpaj viktimoj, dum septembro 1923.

Konigante al vi la sangsoifon de l'Bulgara registaro, ni alvokas vin, anarkistaj kamaradoj, por protesti, per energia agado kontraŭ la ekzekutistoj de niaj bulgaraj fratoj: la plej bonaj filoj de l'Bulgara popolo.

Berlin la 20. Junio 1925.

La Uniono de la Bulgaraj anarkistaj grupoj ekstere de Bulgario. *Esperantigis 659.*

Rilatoj inter SAT kaj la LEA-oj

Unue mi intencis raporti pri tiu temo, sed multaj k-doj jam plenumis la perliteran fakon en "Sennaciulo". Mi do rezignas pri tiu unua parto kaj pritraktas nur la duan, t. e. la perĉifran parton.

Jen sufiĉe klara tabelo.

Landoj	*Nombro da SAT-anoj*[1])	*Nombro da LEA-anoj*
Britio	31	170
Estonio	14	60
Francio	240	268
Germanio	1488	2927
Hungario	25	800 [2])
Nederlando	21	250
Norvegio	6	72
Svedio	25	650

Ĉiuj nombroj temas pri la stato je 31. 12. 24 kaj devenas oficiale de la koncernaj asocioj; multaj ne respondis, kvankam antaŭ pli ol 6 monatoj demanditaj.

El tio, ni tuj konstatas ke nur en Francio (sen nacieca spirito), la nombroj estas preskaŭ samaj, en ĉiuj aliaj landoj grava diferenco ekzistas, je la malprofito de SAT.

Mi ne insistu pri la koncernaj motivoj, multaj pretekstas politikan flankon, mi ne volas igi konfliktojn kiam ni pleje bezonas unuecon.

Mi nur citu la rezoluciojn de LEA-aj kongresoj favoraj al SAT.

Organizaĵoj	*Datoj*	*Rezolucioj*
Finlanda LEA	fonda kunveno 6. 1. 23.	devigo de aliĝo
FEO (Francio)	IIa Kong. Pentekosto 23	rekomendo
GLEA (grup. Mannheim)	Julio 23	kunfandiĝo de lokaj grupoj
SEU (grup. Nij-Novgorod)	Oktobro 23	alvoko
Grupo Frateco (Wien)	Jarkunveno 16. 12. 23	aprobo k. akcepto de statuto
GLEA (grup. Landshut)	17. 3. 24	alvoko
Brita LES	19. 4. 24	alvoko kaj aldono al statuto
Germanlingva LEA	Va Kong. Pasko 24	alvoko
Norvega ALE	30. VIII. 24	alvoko

Verŝajne tute malkompleta estas tiu tabelo, sed la mondo estas tiel vasta ke estas malfacile ĉion scii. *Edo 883*

La laborista esperantista movado en Aŭstrio

Mallonga tempo nur disigas la SAT-anaron de ĝia V. kongreso, kiu nunjare okazos en Wien, ĉefurbo de la respubliko Aŭstrio.

Certe interesas la SAT-anaron, ekscii ion pri la laborista Esp-movado en Aŭstrio, jam pro tio, ĉar ne estas konata ĝia historio kaj preskaŭ ne ĝia nuna stato. Jen mallonga skizo:

La komenco de la movado retrodatas ĝis la jaro 1912, kiam fondiĝis "Frateco" — Bohema laborista Esp-klubo. Dum la unua tempo tiu ĉi klubo havis vere internacian aspekton, ĉar preskaŭ ĉiu membro apartenis al alia nacio. Dum la mondmilito kompreneble finiĝis la agado de la klubo, la polico malpermesis la kunvenojn kaj la tiama estro, k-do Oskar Zimmermann, estis sub konstanta polica "gardo". El ĉiuj membroj nur tri restis en Wien, la aliaj estis jetitaj al la "kampo de l'honoro".

Baldaŭ post la milito la movado reviviĝis, novaj anoj estis varbitaj, kursoj gvidataj. Ankaŭ en la provincoj la movado forte ekfunkciis, kaj en jaro 1922 estis fondita en Linz la "Aŭstria Laborista Ligo". Dum la 2. Liga jarkonferenco 1923 en Linz, la estrecon transprenis la Wien'aj grupoj. La 1. de junio 1924 en Wien okazis la 3. jarkonferenco, kiu decidis reorganizon de la movado kaj ŝanĝis la ligonomon al "Aŭstria Laborista Ligo Esperantista".

Nuntempe ekzistas 12 lokaj grupoj de la ligo en Wien kaj grupoj en Blumau, Bregenz, Hallein, Innsbruck, Leobersdorf, Linz, Salzburg, Steyr, Villach, Wels, Wiener-Neustadt, krome multaj izolaj membroj. Entute la Ligo ampleksas 750 membrojn. Dum pasinta instrusezono estis aranĝitaj 42 kursoj kun proksimume 1200 partoprenantoj, la ligo pere de la grupoj disvendis 1000 lernolibrojn kaj 300 vortarojn.

La 9. kaj 10. de aŭgusto, do ĝuste antaŭ la V. SAT-kongreso okazos en Wien, IX., Währingerstrasse 43 (Magistrata domo). Ni kore invitas ĉiujn eksterlandajn k-dojn, kiuj jam antaŭ la kongreso venos al Wien, partopreni kiel gastoj. K-doj dezirantaj ĉeesti nian jarkunvenon, anoncu tion al la sekretario de la Ligo: K-do *Franz Jonas, Wien XXI*, Jedlersdorferplatz 33.

[1]) La ciferoj nuntempe estas aliaj. Rigardu Jarlibron. — *Red.*

[2]) La diferenco en Hungario ĉefe devenas de la malpermeso registara aliĝi al SAT.

Esp-on je la servo de ateismo!

K-doj el ĉiuj landoj estas invitataj **sendi ĉiajn materialojn pri ateista movado** por publikigo en ruslingvaj ateistaj gazetoj.

Precipe valoraj estas *detalaj kaj koncizaj raportoj pri la proleta ateista movado* en la koncerna lando.

Estas ankaŭ taŭgaj la freŝaj kronikaĵoj pri la ateista agado.

Ĉion sendu al: *V. Kolĉinski, Kremenĉug, Ukrainio.*

Al sama adreso sin anoncu la k-doj, kiuj deziras partopreni *peresperantan ateistan laboron* (tradukado kaj interŝanĝo de artikoloj, helpo al interkorespondado de ateistaj org.-joj, ktp.) kaj formi ateistan fakon.

KRONIKO

Aŭstrio

Wien. Okazis jubileo 30-jara de la Turista Asocio "La Naturamikoj" kune kun la 10. ĉefkunveno de l'Asocio de 4.—7. julio en la naskiĝurbo Wien. Sabate posttagmeze estis festa inaŭguro de nova parko nomita laŭ la unua prezidanto de la Asocio, Alois Rohrauer kaj tie festa malkovro de la Rohrauerreliefaĵo. La gemembroj de tuta Vieno kaj la delegitoj kun muziko marŝis ĝis la festloko. Ankaŭ la esp-istoj sub sia standardo partoprenis kaj faris bonan propagandon. Dimanĉe okazis festo en la plej bela parko de W., Schönbrunn. La ĝeneralkunveno dum 4 tagoj akceptis multajn valorajn decidojn por la evoluo de la asocio. En la nomo de Viena Esp.-Grupo ties sekretario Ultmann disdonis propagandfoliojn kaj invitis al kunveno de la grupo. Tie oni priparolis la pluajn laborojn de la nelonge fondita grupo, kiu bone prosperas. Adr.: Esp. Grupo de la Turista Asocio "La Naturamikoj", sekr. *Max Ultmann, Wien IX*, Berggasse 32/6.

La Aŭstria Laborista Ligo Esperantista okazigos la 9. kaj 10. de aŭg. 1925 sian 4-jaran plenkunvenon en Wien IX, Währingerstr. 43. K-doj, estante en Wien, estas kore invitataj, viziti nin. Ili sin anoncu al k-do *Franz Jonas, Wien XXI*, Jedlersdorferplatz 33.

Sovet-Unio

Gomel. Gomela Gub. Konferenco okazis 5. julio. Ĉeestis preskaŭ 40 delegitoj el Gomel, Reĉica, Novozybkov. Nome de Blankrusia C. O. SEU salutis k-do Snejko. Raporton de Gubkom. faris k-do Mnuĥin. K-do Snejko raportis pri laboro farita kaj organiza demando. Konferenco elektis novan gub. komitaton kaj delegiton por Tutsoveta Kongreso.

Minsk. 26. 6. okazis kunveno de aktivuloj. K-do Sapirŝtejn faris raporton pri somera laboro. 27. 6. tuturba kunveno esp-ista. K-do Snejko raportis pri Radio kaj Esp., k-do Kirjuŝin pri "metodoj de laboro en ĉeletoj". M. Distr. Kom. komencis laboron inter blinduloj. Post du semajnoj aperos unua n-o de jurnalo "Martelo", kiu aperos dufoje monate, unu eldono por rusoj, dua por eksterlando. "Martelo" estas ofic. organo de Blankrusia Intern. Lab. Kunligejo.

Odessa. En la tuturba lerneja ekspozicio, kiu malfermiĝis 29/5., estas aranĝita ankaŭ la fako: "Internacia infana kunligo per esperanto". Leteroj, poŝtkartoj, desegnaĵoj ricevitaj el diversaj partoj de la mondo. En loka gazeto laborista korespondantoj propagandas utiligon de esperanto por interligiĝo kun alilandaj lab. korespondantoj.

Societa vivo de militinvalidoj en Kievo.

En Kievo nuntempe funkcias 3 kluboj. La unua troviĝas en Invalida urbeto, kie loĝas proksimume 600 invalidoj kun familioj. En urbeto funkcias laborejoj, en kiuj invalidoj preparas sin por diversaj metioj. En urbeto ekzistas ankaŭ lernejo kun du fakoj: elektroteknika kaj kooperkalkulista. Estas ankaŭ propra klubo. La plej bona estas centra klubo. Ĝi lokiĝas en 12 grandaj ĉambroj kun salono havanta lokojn por kelkaj centoj da ĉeestantoj. La kluboj celas disvastigi sciojn inter siaj membroj. En ĉi-kluboj ĉiusemajne oni organizas diversajn spektaklojn; rusajn, hebreajn kaj ukrainajn: oni koncertas; estas ankaŭ kino kun la plej bonaj filmoj; oni legas lekciojn pri diversaj temoj, historio de revolucia movado, geografio ktp. Estas virinrondeto, 2 batalionoj de junaj pioniroj. Komencis funkcii ankaŭ esperanta grupo, sed kaŭze de somertempo ĉiuj lekcioj estas prokrastitaj ĝis aŭtuno. Nun invalidoj propramane konstruas sportplaceton. Unuvorte, la klubo celas disvastigi sciojn inter la membroj. Kart- kaj aliaj hazardludoj estas malpermesataj. Invalidoj iom post iom organizas laborkolektivojn. Ĝis nun jam funkcias 65 diversmetiaj kolektivoj. En tiuj ĉi kolektivoj estas okupataj proksimume 800 personoj. Sendante sian fratecan saluton al eksterlandaj samsortanoj, la klubo petas invalidajn organizaĵojn kaj ankaŭ apartajn invalidojn, konatigi Kievajn invalidojn kun sia vivo kaj stato. Bedaŭrinde Kievaj invalidoj tre skeptike rilatas al esperanto. Pruvu, ke ĝi ne estas bagatelo kaj sendu por pli detala interkonatiĝo leterojn. Se estas eble, sendu ankaŭ prospektojn, katalogojn, propagandilojn ktp. por ke la klubo povu prepari ekspozicion. Adreso: Ukrainio, *Kievo*, str. Vorovskaja 2, *Invalida Klubo*, A. Grinberg (4545, inval. ruĝarm).

La proksima numero aperos kiel duobla (Kongres-)numero ĉirkaŭ 10. aŭgusto.

SUPLEMENTA PAĜO AL "SENNACIULO"
N.o 44 — 30. JULIO 1925

LA LERNANTO

PETRO FRATECE SALUTAS ĈIUJN LERNANTOJN STUDEMAJN. ĈU LI JAM PREZENTIS SIN AL VI?

Du kontrastoj

Skizo de Carl Hagert

En tiu tempo, kiam la terglobo estis juna, troviĝis du viroj, kiuj vivadis en tre malegalaj vivkondiĉoj. La unua el ili vivis en riĉeco kaj bonstato, kial li estis nomata Propraĵpotenculo, la alia vivis en malriĉeco kaj estis sklavo al Propraĵpotenculo, kial li estis nomata Senhavulo. La unua, kiu posedis la tutan terglobon, havis pro tio grandan potencon, kiun li uzis por turmenti la alian, kiu nek havis posedaĵon nek potencon.

Tagon Senhavulo venis al Propraĵpotenculo kaj diris al li:

— Tiun ĉi propraĵon vi ne honestmaniere ricevis. Mi memoras tiun tempon, kiam vi ĝin okupis. La tero apartenis al neniu; la fruktojn de la tero ni interdividis. Sed iun tagon vi venis al mi kaj diris: "Ĉi tiu propraĵo kaj la tuta brutaro, kiujn vi ĉi tie vidas, estas mia". Mi protestis kontraŭ tio; sed ruza kiel vi estas, vi promesis al mi senzorgan ekzistadon en via servo. Tiun promeson vi neniam plenumis. Ĉiufoje, kiam mi rememorigis vin pri tio, vi minacis maldungi min kaj bari min de aliro al la fruktoj de la tero. Mi postulas, ke vi lasas la teron libera, kia ĝi estis antaŭe. Kaj ni ambaŭ povus ĝui el la fruktoj de la tero, kaj la frateco estus sanktigita.

Tiam koleriĝis Propraĵpotenculo kaj respondis:

Mi posedas la propraĵon, tial mi ankaŭ havas la potencon. Mi estas pli potenca ol vi, tial mi devigas vin obei al mi. Mi proponas al vi du alternativojn, el kiuj vi povas elekti: aŭ vi estas devigata resti ĉe mi, kaj labori por salajro tia, kian mi volas doni al vi, aŭ vi mem zorgu por vi, sed kun malpermeso, ke vi neniam estu rajtigata tuŝi mian propraĵon.

— Kiel vi volas, respondis Senhavulo, vi mem komencis la batalon. Mi ĵuras je la tero mem, kiu donis sian frukton al ni ambaŭ, ke mi ne ripozos antaŭ ol mi venĝis. Mi servos al vi, ĝis tiu tago venos, kiam mi estos sufiĉe potenca por preni la propraĵon de vi. Kion vi faris kontraŭ mi, tion mi faros kontraŭ vi.

La tempo forpasis. Ni nun estas en la 20a centjaro, kaj la ambaŭ viroj komenciĝis esti maljunaj. Propraĵpotenculo estas infektita de nekuracebla malsano, kiu estas nomata avareco. Tiu malsano turmentas lin konstante, kaj li neniam sentas sin plene kontenta. Spite de tio ke lia propraĵo progresis, li ofte fariĝas malkontenta. Kiam la malsano tro turmentas lin, okazas kelkfoje, ke li komisias al Senhavulo disŝirbati parton el la propraĵo. En jaro 1914 li ordonis lin disŝirbati multegon da urboj kaj vilaĝoj, kio ankaŭ estis plenumata. Ŝajnas, ke Senhavulo tamen laciĝis je tia vivostato, kaj ŝajnas, ke li ne pli longe povus elteni en la mallibereco. Malamplene, li nun rigardas Propraĵpotenculon kaj laŭtvoĉe kriegas:

— Malfermu la pordegon al la fruktoj de la tero, aliokaze mi ĝin krevigos!

El sveda lingvo tradukis *Karl Johansson.*

Depost dek jaroj

Bona, sunplena tago. Okjara knabino kun sia vartistino promenis en ĝardeno. La knabino estis riĉe vestita, havis multajn ludilojn, sed ĉiuminute ŝi komencadis ploraĉi turmentante sian vartistinon.

La knabino estis tro riĉa, ŝi havis absolute ĉion kaj ŝi eĉ ne sciis, kion ŝi volus pli. Pro tio-ĉi ŝi ploris.

Subite strangaj, nekompreneblaj sonoj ekinteresigis ŝin. Timiĝinta vartistino volis kapti ŝin sur manojn kaj kuregi hejmen, ĉar la vartistino eksentis danĝeron. Sed knabinaĉo elsaltis el la manoj kaj komencis kuri alian flankon, al la sonoj.

Ŝi ekvidis ĉi-bildon: tuta strato estis plenplena de ĝemoj kaj krioj.

Unu post alia eklumiĝadis lumeretoj kaj kugloj, zumante, flugis preter ŝiaj oreloj. Sur tero kuŝadis vunditaj kaj mortigitaj gehomoj, elsub kiuj diskuradis malgrandaj ondetoj da sango.

Knabino ektremis. Kun krio ŝi komencis kuradi reen, hejmen, ĉiam pli kaj pli rapide. Sed enfluginte domon de sia riĉa patro, ŝi trovis ĝin malplena. Gepatroj, tuta familio kaj servistaro diskuris.

Ploregante eliris knabino straton. Trapasanta, nigra de l' petrolo laboristo kun granda pafilo prenis ŝian maneton kaj alkondukis la knabinon al sia familio.

Tio estis dum tagoj de l' Revolucio.

— — — — — — — —

Forpasis dek jaroj. Iama knabino nun estas preskaŭ virino. Kaj ŝi neniam ploras, sed ne pro tio, ke ŝi estas "grandaĝa", sed pro tio, ke ŝi ĉiam havas laboron.

Ŝiaj iam delikataj manetoj nun estas ruĝaj pro laboro, sed tio ŝin ne timigas. En la simpla sportvestaĵo, anstataŭ iama riĉa, ŝi matene iras fabrikon labori, tage — laboras hejme, kuirante aŭ farante ion alian. Kaj vespere en laborista klubejo ŝi balancas sur sportludiloj aŭ lernas en ia scienca "rondeto". Raportante kaj diskutante, ŝi neniam forgesas, ke ŝi estas membrino de l' gejunulara komununuiĝo, estonta partianino.

Iam memorante sian estintecon, ŝi ridas pri ĝi kaj dankas la Laboron, kiu faris ŝin necesa por la socio homino, anstataŭ tutviva eĉ ĝismorta riĉevestita grandaĝa kaprica bubino.

Esperante verkita de *Skribemulo.*

Kaj vi?...

Mia frato trovis malgrandan gracian salamandron kaj hejmen portis ĝin. Li rabis al ĝi la liberecon. En mallarĝa glaso kun iomete da sablo kaj akvo li loĝigis la beston kaj amuze rigardadis ĝin. Afable li ankoraŭ enplantis akvan kreskaĵon, por ke la besto havu ion verdan. En ĉi tiu malliberejo nun vivis la besteto, kiu ja estis kutimiĝinta al suno, lumo kaj tero. Kiel nutraĵo mia frato donis duonmortajn akvajn pulojn.

Nur mallongan tempspacon la salamandro naĝis tien kaj reen. Baldaŭ ĝi sentis la glasan mallarĝecon kaj senmove ĝi kuŝis, palpebrumante per la etaj nigraj okuloj tra la vitraĵon. Eĉ la puloj ne sukcesis vigligi ĝin. Subite ĝi provis suprengrimpi la glason. Vane! Ĝia mola korpeto deglitiĝinte ĉiam falis teren. Kuraĝe ĝi alkroĉiĝis al la akva planto, intencante, de la kreskaĵo atingi la glasan randon. Sensukcese! La salamandro troviĝis en neelirebla loko. Kaj tamen — alian matenon la besto — estis for. Ni homoj oftfoje estas nesentemaj rilate al bestoj. Kaj ekmoviĝis konscienco mia. Mi serĉis, ne longtempe — jen la salamandro kuŝis tere, mortiĝinte.

Larmoj plenigis miajn okulojn. Mi sentis min kulpa, ĉar mi ne helpis estaĵon soifantan al libereco, kiu estis pli malforta ol mi. Mi ne atentis ĝian malesperon. Nun la besto realigis sian sopiron, sed kostis la vivon. Kaj vi?...

Ĉu vi ne ankaŭ volas kuraĝe batali por via liberigo? Ĉu vi ne volas helpi liberigi la aliajn subpremitajn, ekspluatatajn homojn de iliaj turmentoj? Ĉu vi scias, ke vi mem estas unu el la milionoj, kiuj nur povas elekti inter: por aliaj labori aŭ — malsatmorti? La malgranda senforta besto malgraŭ ĉiuj malhelpaĵoj trovis la liberigan vojon kaj ne timis la morton. Kaj vi?...

El "Junge Genosse" tradukis *Aso 3414.*

La nova doktrino

L. Jacobi

Tio estas la grandiozaĵo,
kion la nova doktrin' manifestas:
Ke ĝi postulas de l' homo,
li estu *Laboristo* sur tero
kaj same de l' laboristo,
ke li estu *Homo* sur tero,
kia li ĝis nuntempe neniam ebliĝis esti. —
Ĝi postulas de la *Homo*
en la mondospaco kaj sur tero la jenon:
Malantaŭ li estu . . . . *Laboro!*
Sub li estu . . . . *Egaleco!*
Maldekstre estu . . . . *Amo!*
Dekstre estu . . . . *Justeco!*
Antaŭ li estu . . . . *Vero!*
Super li estu . . . . *Libero!*
Sed *en* li estu . . . . *Beleco!*

Esperantigis: E. B.

PRESEJO: UNS-PRODUKTIVGENOSSENSCHAFT, LEIPZIG (GERMANIO)